

世 汉 对 照 读 物

灯塔看守人

LA LANTERNISTO
KAJ
ALIAJ NOVELOJ



中国世界语出版社

41.95

LA

LA LANTERNISTO KAJ ALIAJ NOVELOJ

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

BEIJING, 1982

灯塔看守人

中国世界語出版社出版
(北京百万庄路24号)

外文印刷厂印刷

中国国际书店发行

世界語书刊服务部办理邮购

(北京百万庄路24号)

1982年(32开)第一版

00080

编号: (世)9278-3

10—EsC—1657p

ENHAVO

<i>Afonso Arinos:</i> Petro, la Barkisto	2
<i>Mela Escherich:</i> Maruška	22
<i>R. Tagore:</i> Nubo kaj Suno	50
<i>R. Tagore:</i> Reveno de Khoka-babu	106
<i>H. Sienkiewicz:</i> La Lanternisto	126
Klarigoj	160

La Lanternisto kaj Aliaj Noveloj

PETRO, LA BARKISTO

Verkita de AFONSO ARINOS

Esperantigita de GERALDO MATOS

“Mi tuj rakontos al vi”, diris al mi Flor, jam proksime al la Stona Kruco. “En tiu tempo mi estis malfortika, korpe delikata, kun brakoj kaj kruroj facilmovaj. Mia mastro, perfortema kaj timata, havis ĉiam en sia domo dudekon da satelitoj, pretaj por ĉia aventuro. Mi havis duonmejltrafan pafilon, kun la tubo garnita per ŝtalo, kiu estis mia nedisigebla kunulo.” Kaj sin pli komforte aranĝinte sur la selo, li malstreĉis la bridon de la brave marŝanta ruĝbruna mulino. Poste, apoginte sin sur unu kruron, li kliniĝis flanken kaj, preminte la brulantan finon de la cigaredo sur la ungon de la dikfingro, li elblovis nubon da fumo.

“Iam ni amuziĝis sub la muziko de la gitaro de Adamo. Mi kuŝis sur la surselaj ŝafofeloj sternitaj sur la tero. Ĉirkaŭe, la tuta kamaradaro. Ne multon ni havis por fari kaj tiel la tempo forpasadis.

“Jen subite, kun sia tiel konata decidemeco, eniras la mastro kaj diras, turninte sin al junulo, kiu lin akompanis: ‘Por Petro, la Barkisto, ĉi tiuj du knaboj sufiĉas!’ Samtempe li montris min kaj Paskoalon per la fingro. ‘Por tio mi ne bezonas ĝeni miajn “largabrustulojn”. Flor kaj Paskoal tien ĉi kondukos la negron, ligitan per ŝnuro.’

“Kial mi mensogus, kara sinjoro? la koro saltis en mi kaj mi diris al mi mem: ‘mi estas perdita!’ Paskoal min strabe rigardis. Sajnas, ke la mastro volis nin provi¹. Ni estis la plej novaj el la kamaradoj kaj nenion ni antaŭe faris, krom reko-

船 夫 彼 得

〔巴西〕阿方索·艾里诺斯作

“我马上讲个故事给你听，”在离石十字架很近的地方，弗劳尔对我说。“那时我身子骨儿很单薄，身材也娇小，倒是胳膊和腿都还灵便。我的主人狂暴而又怯懦，家里总有二十个保镖，以防万一。我有一枝可以打半英里远的枪，枪筒上都包上了钢片，这是我不能离手的伙伴。”他在鞍子上使自己坐得更舒适以后，给勇往直前的红褐色母骡放松了缰绳。后来又用一只腿蹬紧，侧过身子，将燃着的烟头在姆指的指甲上捺一下，吐出了一团烟雾。

“有一次我们在亚当的吉他乐声中作乐。我把马鞍上的羊皮铺在地上躺下。周围都是自己人。我们无事可做，时间也就这样过去了。

“突然，主人进来了，脸上又还是那种熟悉的很有决心的神气。他转身对跟他一道来的一个年青人说：‘这两个小子对付那个船夫彼得尽够了。’他用手指着我和巴斯考尔，‘这件事用不着去麻烦我的那些阔胸脯了。弗劳尔和巴斯考尔会把那个黑鬼用绳子缚着带到这里来的。’

“我何须隐瞒呢，亲爱的先生？我的心在蹦蹦地跳，我对自己说：‘我完了！’巴斯考尔斜眼看着我。主人似乎想试一试我们。我们俩在这些同事中都是新手，以前除了追跑散了的牲口和捕捉过一头逃走的驴子以外，没有做过什么。我常常听人说起过曾在城里出现过的船夫彼得，但是他

lekti la diskurintan brutaron aŭ kapti iun malaperintan azenon. Mi ofte jam aŭdadis pri Petro, la Barkisto, iam aperinta en la urbo, sed kiu li estas, de kie li venis, neniuj sciis. Okaze mi konatiĝis kun li, kaj ni interparolis. Kia bela artaĵo, kara sinjoro! Negro karbonigra, alta, fortika, nemulte parolema kaj senĝena. Ĉiu lia brako estis kvazaŭ branĉo de palisandro.

“Li staras nun antaŭ miaj okuloj, kun sia kutima blua vesto, tinkturita en Barro Preto; ĉe la zono estis oblikve fiksita tranĉarmilo, longa, akra, ĉiam brilanta, iom pli granda ol tranĉilego, sed malpli granda ol spado. Tiu negro timigis ĉiujn ĉe la sola ekrigardo, sed li estis impona. Ĉiujn li rigardis kun ia supereco, de supre malsupren, kvazaŭ li estus certa, ke iu, kiun prenis lia mano, kadavriĝus kiel rato. Neniu ĝenis lin, ankaŭ neniun li ĝenis. Kviete li vivadis en sia angulo.² Unu tagon ekblovigis la famo, ke li estas forkurinta negro, sklavo de sinjoro loĝanta proksime de Karinjanja. Ankaŭ la orelojn de la mastro tiu onidiro frapis. Kia malfeliĉo, ke ĝi venis, mia Dio! Negron aŭ mulaton paveman la mastro nevolonte rigardis. Li volis, ke ĉiu antaŭ li deprenu sian ĉapelon kaj petu lian benon!

“Cetere, oni rakontadis multe da trabravajoj³ de la Barkisto, tiel nomata, ĉar li venis el la regiono de la rivero Sankta Francisko. Tiuj paroloj ĉiam pli kaj pli flamigis la mastron; lin mi jam antaŭvidis sur la strato, kun la intestoj eksteren, tial ke li estis viro, kiu alfrontus danĝeron, se oni lin ofendus.

“Mi kaj Paskoal timis, ke la mastro renkontos Petron, la Barkiston, ie en la urbo.

“Pli grandaj fariĝis nia timo kaj la kolero de la mastro, kiam ni sciigis, ke Petro ĉeestis batukon⁴, en la domo de Maria Nova, ĉe la strato de la Abatejo.

“El Pedra dos Angicos estis veninta letero, kun la ordono aresti Petron, kaj la juĝisto ordonis lian areston. Oni sieĝis la domon, kie li troviĝis dum la nokto de la batuko. Ha, kara

是谁？从哪里来的？却没有人知道他。有一次，我偶然和他认识了，并且我们还谈过话。那是多么美妙的一个艺术品，亲爱的先生！黑人，墨黑、高大、结实，不爱说话，无忧无虑。他的膀子就像紫檀树干一般。

“现在他站在我的眼前，穿着他日常穿的在巴罗·泼莱得染的浅蓝衣服，腰带上斜挂着一把又长又利，亮光闪闪，比普通的刀大一些，但又比剑小些的佩刀。对这个黑人瞧一眼也叫人怪怕的，但却有一种使人敬畏的感觉。他傲视一切，高高在上，好像他有这样的信心：谁落到他手里，就会象老鼠一样，一下就给捏死似的。没有人敢打扰他，他也不打扰别人。他只在他自己的一个小天地里安安静静地过他的日子。有一天，忽然传来了消息，说他是从卡林阳亚附近逃跑的一个黑奴。我的主人也听到这个消息。这个消息来得多么的不幸呀，我的上帝！主人就是见不得这种黑人和神气活现的混血儿。他要站在他面前的人都脱下帽子向他请安求福！

“人们还讲了很多有关这个船夫所经历过的英勇事迹。他之所以被人叫做船夫，是因为他来自圣·弗朗西斯河地区的缘故。这种话更使主人光火，我已经预见到总有一天他会在街上肠肚都给人戳出来的，因为他就是这样一种人，如果有人冒犯他，他就会什么危险都不怕的。

“我和巴斯考尔都担心主人会在城里遇上彼得。

“当我们知道彼得曾在僧院街玛琍亚·诺娃的家里参加巴杜克舞会的时候，主人更加忿怒，而我们也就越加害怕。

“从比塔拉·杜斯·安奇戈来了一道逮捕彼得的命令，法官就下令逮捕他。人们把他那天晚上跳过舞的房子包围起来。呀，亲爱的先生，那黑人这时才显出他真是一个勇士。

sinjoro! la negro tiam montris, ke li estas bravulo en sia angulo. Vere li ne estis bone armita, tute ne: li portis nur sian armilon, ĉiam brilantan; kaj per tiu li faris miraklojn. Kiam, post la sieĝo de la domo, oni deklaris lin arestita, la negro sulkigis la brovon kaj ekŝaŭmis de furiozo, simile al incitita krokodilo. Li sin turnis al la pordo ĉe la strato, kaj apogis la dorson al muro. Maria Nova staris apud li kaj diris al mi, ke li murmuris preĝon, premante inter la fingroj sanktan pendajeton, kiu blanke distingiĝis sur la nigra haŭto de lia kvazaŭ glazurita larĝa brusto.

“En la domon tri viroj sukcesis eniri, sed li sternis ĉiujn tri. Petro havis preĝon, la tre bonan preĝon kontraŭ pafiloj, ĉar Jozefo-Etulo, dikmalalta mulato, tiris la ĉanon de karabeno kaj ekpafis sur la negron. Petro, la Barkisto, sin ĵetis sur lin tra la fumo de la pulvo kaj, kiam fariĝis hele en la ĉambro, Jozefo-Etulo kuŝis sur la tero, kvazaŭ buĉita bovo.

“Malgraŭ tio, aliaj du junuloj volis lin kapti, sed Petro, la Barkisto, batfalis unu kaj metis al la dua la intestojn eksteren; ili ja saviĝis, sed longatempe ili ĝemadis tie sur la tero.

“De tiam Petro evitis iradi en la urbo, kie li aperis de tempo al tempo kaj dum la nokto. Lin ĉiu timis kaj ĉiamaniere ĉirkaŭflatadis.

“Unu tagon, kiel mi jam sciigis al vi, venis nian domon junulo, kiu petis mian mastron pri helpo, por kapti la forkurintan negron. Fakte, la Barkisto estis sklavo, sed de multaj jaroj li vivis kiel forkurinto. Mi jam diris al vi, ke la mastro volis rompi la kornojn al la bravulo kaj por tio li bedaŭrinde elektis min kaj Paskoalon.

“‘Kion vi diras, Flor?’ ridante demandis la mastro.

“‘Nu, kara sinjoro, se via moŝto ordonas, la negro ja venos, kaj ligita.’

“‘Tion mi volas vidi.’

他的确没有很好的武装，完全没有：他只带了他那把亮晃晃的刀，但他就凭了这把刀创造了奇迹。当房子被包围，人们宣布他已经被捕的时候，他皱着眉头，像一条被激怒的鳄鱼一样地暴跳如雷。他转身向着街门，背靠着墙。玛珥亚·诺娃站在他旁边对我说，他在喃喃地念着咒，手指间捏着挂在胸前闪闪发光的圣象，这正和他那宽胸脯上好似涂了釉彩一样漆黑的皮肤成了鲜明的对比。

“终于有三个人进了房子，但他把三个都打得趴下了。彼得会念很有效的刀枪不入的咒语，因为小个子约瑟夫，一个矮胖的混血儿，曾拉了马枪的扳机，向这个黑人身上打去。但船夫彼得在火药烟雾中向着他扑过去，当房子里的烟雾散了以后，小个子约瑟夫已经象一头宰了的牛一样，躺在地上了。

“可是另外两个小伙子，还是想抓住他，但彼得打倒了一个，又把另一个的肠子戳出来了，结果他们虽是活下来了，但还是躺在地上呻吟了很久。

“从此以后，彼得就不到城里来了。以前他是时常来的，而且常常在夜间。那时每个人都怕他，都对他百般奉承。

“有一天，正如我已经告诉你的，我们的屋里来了一个青年，他请求我的主人帮助他捉拿逃跑的黑人。事实上，船夫确是奴隶，不过，他已逃出来许多年了。我已经跟你说过，主人想煞一煞这个勇士的威风，于是我和巴斯考尔就算倒霉了。

“‘你说什么，弗劳尔？’主人笑着问道。

“‘唔，老爷，如果您下一道命令，那个黑鬼就会前来，受缚。’

“‘我倒要看一看。’

“Ni foriru, Paskoal!”

“Kiam ni estis pretaj foriri, la mastro frapis mian ŝultron kaj per firma tono diris al la junulo: ‘Vi povas antaŭsciigi la eskorton, ke ili venu ĉi tien posttagmeze por forkonduki lin. Ili donos al ĉi tiuj bravuloj ducent milrejsojn’.⁵

“Mi malsupreniris en la ĉambron de la seloj, prenis la pafilon kaj la tranĉilegon, kaj streĉis la rimenon ĉirkaŭ la talio.

“Jam ĉe la pordo, kondukanta sur la straton, Paskoal fajfadis. Li kutimis, en tiaj momentoj de danĝero, fajfi kanton, kies vortoj estas jenaj:

“Mi aŭskultis en l’ arbaro

Birdon, kiu ĝemis ve;

Tiel ĝi ĝemadas:

Aj-re-ŭe, um, aj-re!”

“Vidinte min, Paskoal eksplodis per rido.

“‘Vi estas freneza, infano!’ li diris al mi.

“‘Kial?’

“‘Vi do ja intencas alfronti la Barkiston? Li simple faros el ni kaĉon. Fariĝos la afero en alia maniero.’

“Paskoal estis saĝa kaj mi ĉiam fidis lin. Li havis la kapon sur la ĝusta loko. Tiaj ideoj elsaltas el lia kranio!... Li konsilis al mi remeti en iliajn lokojn la pafilon kaj la tranĉilon. Poste, li iris en butikon, elektis fiŝhokojn kaj revenis domon por ilin prepari. Mi eĉ ne ekpepis! Mi helpis lin ĝis la fino, certa, ke ion Paskoal havas en la kapo.

“‘Lasu al mi la aferon,’ li aldiris.

“Estis apenaŭ matene; la suno staris ĉirkaŭ tri klaftojn super la horizonto, en la sezono de la longaj tagoj. En nia domo, ni vekigadis frue, por alporti de la paŝtejo la rajdobestojn.

“‘Ni iru fiŝkapti,’ diris al mi Paskoal. ‘Proksime de Petro, la Barkisto, ĉe la granda arbo, ekzistas laĝeto, kie kurumatanoj’⁶

“‘我们走吧，巴斯考尔！’

“当我们准备好了要去的时候，主人拍了拍我的肩膀，并用坚定的口吻对那个小伙子说：‘你可以预先通知保镖，叫他们下午来把他带走。他们要给这些勇士二百个密耳瑞斯。’

“我走下放鞍子的房间里去拿枪和大刀，并把腰带拉拉紧。

“到了街门口的时候，巴斯考尔吹起了口哨。他喜欢在危险的时候吹起歌曲，歌词是这样的：

我在林中听见了

鸟儿喳喳叫；

它在这样地呻吟道：

噉啦喂噉噉啦！

“看见了我，巴斯考尔就发笑了。

“‘你疯了，小子！’他对我说。

“‘干吗？’

“‘难道你真的想去碰一碰那个船夫？他随便就可以把我们捏成肉酱。那样一来，事情就会变样啦。’

“巴斯考尔是聪明人，我常常相信他的话。他的脑袋长得恰到好处，好主意一晃就会从他的脑壳里晃了出来。……他劝我把枪和刀放回原处。之后，他就到一家小杂货店里选购了几个鱼钩，回到家来把它们准备好。我一声也不哼，只帮着他，到了最后才觉得巴斯考尔的头脑里真有他的！

“‘把这事都交给我吧。’他说。

“差不多还是大清早，太阳约离地平线只有三呎高，是一个白昼比较长的季节。我们很早醒来就到牧场里去牵马骑。

“‘我们钓鱼去。’巴斯考尔跟我说。‘在大树边离船夫彼得家不远的地方有一个池塘，里面的鱼多得象蚂蚁，彼得的小屋子就在附近。他只一个人住在那里，那地方我很熟

kaj piaŭoj⁷ svarmas kiel formikoj. La kabano de Petro, la Barkisto, staras proksime. Li loĝas sola kaj mi bone konas la lokon. Per ruzo ni arestos lin. Kiam mi ekkrios: 'kaptu lin, Flor!' vi brakumu la negron, sed tenu lin streĉe.

"Ni ekiris. En tiu momento mi forte ekdeziris kuri for de la danĝero, promeni foren, ĉar mi estis certa, ke io malbona okazos al ni. 'Kio estas al vi, Flor!' mi diris al mi mem: 'Viro viron egalas!' Paskoal ne lasos min en embaraso. Sed, malsuprenirinte Gorguljon kaj nin turninte al la rivereto, ia ombro kovris mian koron. En tiu tempo mi amindumadis⁸ Emilian, filinon de Jozefo, la Ĉarpentisto. Ŝi estis bela brunulino kaj ne tute indiferenta por mi. Mi povas diri, ke en la antaŭtago, pasante preter mi kun jupo el indieno, punktita per ruĝaj ĉeloj, kun novaj pantofloj el kordova ledo, ŝi longe rigardis min. Ha! kia tinameca⁹ brusteto, kara sinjoro! pufa, ronda, glata kiel lutra ledo. Kun la respekto, kiun mi ŝuldas al vi, kara sinjoro, mi estis enkapitata kaj ĝuste en tiu tago ŝi donacis al mi tiun ĉi lanan zonon, teksitan de ŝi mem, kaj kiun ĝis nun mi zorge konservas.

"'Ho brunulino, al kiuj mi tiel pasie flamas!' mi pensadis, 'kial mi mortu tiele, kun okuloj vidintaj, sed kun manoj ne tuŝintaj?' Tiu ideo, al la diablo, turmentis min tra la tuta vojo kaj tiel, ke mi forte frapiĝis per la piedo kontraŭ ŝtono. Mi klinis min, kaptis per la manoj la piedon, kaj nevolonte dancis kelkan tempon. Poste, mi levis la kapon. Paskoal sidis en kavo de la tero, kaj ridante min fikse rigardadis. Mi levis la kapon kaj ekrigardis supren, meditante. Tra la ĉielo grizaj nuboj kuradis, kvazaŭ bando da histrikoj, vagantaj tra la kampo. Preterblovis forta vento kaj deŝiris de la genipujo¹⁰ la maturajn fruktojn; sur la tero ili diskrevis jen tiel — pof! — kaj timigis la peristerojn¹¹, kiuj skrapis la teron kaj manĝis grajnoj. Du seriemoj¹² ellasadis akregajn kriojn, kvazaŭ faj-filoj. Mi tiam vidis, ke ili interbatalis — tion mi memoras,

悉。我们要用巧计来抓他。当我一声叫喊：“抓住他，弗劳尔！”的时候，你就抱住这个黑鬼，但要把他抱得紧紧地。”

“我们去了。那时我真想从这个危险中逃走，跑到远远的地方去，因为我断定这一去凶多吉少。‘怎么啦！弗劳尔？’我对我自己说，‘男子汉就是男子汉！’巴斯考尔不会让我为难的。但走下了高尔固尔，转向小河的时候，一种阴影笼罩住我的心头。那时我正在热恋着木匠约瑟夫的女儿爱米利亚。她是个美丽的棕发姑娘，而且她也并不是完全无意于我。我可以这样说，前一天她穿着一条印花带红点的裙子，一双用科尔多皮革做的新鞋，打从我旁边走过的时候，打量了我很久。哈！多么饱满的胸脯呵，亲爱的先生，圆而突起，象獭皮一样滑润。我怀着对你一般的敬意，亲爱的先生，完全给勾摄住了，而且正在那一天她送给了我这条她亲手织成的羊毛腰带，这东西我一直是非常珍贵地保存着。

“‘啊，棕发姑娘，我对她的爱情燃烧得多么热烈呀！’我想，‘为什么我要这样地死去，只能眼睁睁地看一看而不能用手摸一摸呢？’这种思想真是见他妈的鬼，一路上都折磨着我，使我狼狠地在石头上顿着脚。我弯着身子，两手捉住脚，好久好久不愿移动一下。后来我抬起了头，巴斯考尔坐在洼地上，瞅着我笑。我抬头望着天，想啊想啊。天上，黑云正在奔驰，象一群在田野里游荡的刺猬似的。大风一阵阵地吹过，把成熟了的茜果，吹落满地，嘎的一声破裂了，把在地上啄食谷粒的山鸠吓了一跳。两只雉鸡发出了几声象吹哨子似的尖叫。我看见他们正在打架——我还很清楚地记得这个情景，好象就在今天发生的一样，有一只跳啊跳的，跳到了另一只的跟前，扇着翅膀，冠上的毛竖起来乱

kvazaŭ ĝi estus hodiaŭ; unu per saltetoj alproksimiĝadis al la dua, svingante la flugilojn, kun hirtigita kresto kaj fajrantaj okuloj. La koro kvazaŭ rediris al mi: 'prikalkulu, Flor, kion vi faros.' Tiam, Paskoal, ĉiam rigardante min de la loko, kie li sidis, kriis al mi:

"Ĉu via cerbo iris promeni tie? Ni iru for, ĉar jam malfruiĝas."

"Mi ekhontis; mi rekonsciiĝis kaj vigle ekiradis. De tiam, en la vojo, mi distriĝis ĉe la spritaĵoj de Paskoal, kiu, tre ŝercema viro, ĉiam havis ion amuzan por rakonti. Veninte malsupren, ni refaldis la pantalonon kaj iris laŭflue de la rivereto, ĉiu kun sia vergo, provizita per hoko, sur la ŝultro.

"Estis necese, ke neniu suspektu nian ruzaĵon por kapti Petron, la Barkiston.

"Tiel deflankiĝis nia konversacio pro la ŝercoj de Paskoal, ke ni jam preskaŭ forgesis la danĝeran ordonon.

"Mallonge dirite, kara sinjoro, ni renkontis Petron, la Barkiston, ĉe lia kabano, kiu havis nur tri fakojn: manĝoĉambro, dormoĉambro kaj la kuirejon.

"Kiam ni alvenis, Petro en la korto disgrajnis la maizon, kiun li kolektis proksime en sia plantejo.

"Vi tie ĉi, knaboj?! Rigardu! iru tien ĉe la lageto, post la akvofalo. Tie estas granda plata ŝtono, de kie vi facile povos kapti piaŭojn en granda amaso."

"'Kristo estu laŭdata, mia onklo!' diris Paskoal kaj mi imitis lin.

"Se vi volas manĝi viandon rostitan sur la stango, detranĉu iom; granda peco estas fumajata super la forno. En la manĝoĉambro estas tranĉilo, se vi ne havas alian ilon."

"Paskoal eniris kaj vidis en angulo de la ĉambro la tranĉilegon, ĉiam brilantan. Li prenis ĝin, eliris tra la pordo de la kuirejo kaj kaŝis ĝin en arbareto malantaŭ la domo. Poste, li fajfis vokante min; mi tuj alkuris kaj ekserĉis la pafilon de

蓬蓬的，眼睛燃着怒火。我的内心好象又在对我说：‘考虑一下吧，弗劳尔，你该怎么办。’这时巴斯考尔老是坐在那里盯着我，并对我叫道：

“‘你的脑袋瓜开小差了吗？我们走呀，时候已经不早了。’

“我觉得很惭愧，我重新恢复了知觉，精神焕发地起步就走。从此我一路都给巴斯考尔幽默的妙语吸引住了，他是一个很喜欢寻开心的人，沿途一直是谈笑风生。到了河边，我们重又卷起了裤筒，顺着河流走去，肩上都背了一根安上鱼钩的钓竿。

“必需做到这点：不要让别人看出我们是在企图捉拿彼得。

“我们的谈话终因巴斯考尔的妙语横生而将主题岔开了，我们几乎已经把危险的命令忘记了。

“简单地说，亲爱的先生，我们在船夫彼得的茅屋里遇见了他。这个茅屋只有三间房子：餐室、寝室和厨房。

“当我们到那里的时候，彼得正在院子里剥玉米，这是他从附近自己地里收获来的。

“‘你们到这里来了，小伙子们？你们瞧！到瀑布后面的湖边去，那里有一块很平的大石，有很多鱼，你们可以大把大把地捉。’

“‘基督是人人赞美的，大叔！’巴斯考尔说，我也模仿着他底口吻。

“‘如果你们要吃挂在杆子上的烤肉，那你们割一点吧，那一大块是在炉子上熏过的。你们要是没有别的用具，那末，餐室里有刀子。’

“巴斯考尔走进去，看见房角里有一把亮晶晶的大刀。他取了刀从厨房门出去，把它藏在屋后的树林子里。后来他